



Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

N-ro 8
1969

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
ĈEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-periodo
35-a (40-a) jaro
Monata

KONGRESAJ REZOLUCIOJ

REZOLUCIO I.

La 54a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Helsinki de la 26a de julio ĝis la 2a de aŭgusto 1969 en la ĉeesto de 1900 reprezentantoj el 38 landoj, *diskutinte* la aktualan mondan lingvan situacion en ĉiuj ĝiaj aspektoj.

I KONSTATAS

1. La politika konstelacio en la nuna mondo estas rezulto de pluraj evolutendencoj ekestintaj kiel sekvo de la Dua Mondmilito kaj determinitaj en la lasta linio de potencpolitiko kiel baza faktoro. Ĝin karakterizas formiĝo de blokoj kaj aliaj interŝtataj grupiĝoj, kontraŭaĵoj interne de la blokoj, antagonismaj streĉitecoj — sociaj kaj naciaj aŭ etnaj — en unuopaj landoj.

2. Tiu politika realaĵo esprimiĝas ankaŭ en la daŭre akriĝantaj luktoj sur la lingva kampo kaj internacie kaj interne de unuopaj ŝtatoj.

Sur internacia nivelo la ĉefaj aspektoj estas diskriminacia dis-

tingo inter oficialaj, laboraj kaj aliaj lingvoj; diversaj formoj de diskriminacio interne de ĉiuj el la tri grupoj; nombra kresko de oficialaj kaj laboraj lingvoj malgraŭ la grandegaj ekonomiaj ŝarĝoj; penetrado aŭ altrudado de «grandlingvoj» en la sferoj de intereso de la koncernaj grandpotencoj kaj ĉiam pli forta rezisto de la malpli privilegiitaj nacioj.

Interne de unuopaj ŝtatoj la ĉefaj aspektoj estas altrudado de unusola nacia lingvo kaj kontraŭstaro de la naciaj aŭ etnaj malplimulto; partaj solvoj, paliativaj lingvaj kompromisoj aŭ perfortaj subpremoj.

3. La dinamismo sur la lingva kampo, ĉiam pli eksploda, postulas radikalan solvon. Principe, ĝi povas esti atingita aŭ per altrudo de unusola nacia lingvo, aŭ per libervola akcepto de la politike kaj socie neŭtrala Internacia Lingvo (Esperanto). Fakte, pro la antagonismaj aspiroj de la grandpotencoj ankaŭ en tiu sfero, pro

estas: Membro-Jarlibro kr. 30,00, Membro-Abonanto (ricevas la Jarlibron kaj la gazeton «Esperanto») kr. 60,00, Membro-Subtenanto (ricevas la Jarlibron kaj la gazeton) kr. 90,00.

55a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Vieno, Aŭstrujo, somero 1970. Aliĝiloj estas riceveblaj de la Turisma Servo de N.E.L., Boks 942, Oslo 1. Pri planoj de komuna vojaĝo ni poste informos.

La Oficeja Fondaĵo. La Liga Estraro kore dankas al ĉiuj bonkoraj, malavaraj donacintoj por tiu grava fondaĵo. Sed ni daŭre bezonas pliajn donacojn por teni la oficejon. Ĉiuj donacoj estas bonvenaj, ĉu ili estas grandaj, ĉu malgrandaj.

Taskotabelo por la kluboj. — *Novembro:* La estraro sendas registritan informon al ĉiuj membroj, kiuj ne ekŝiĝis laŭ la statuto, sed de kiuj tamen revenis la poŝta enkasigilo sen pago, ke oni nun forstrekos ilin kiel klubanojn. La estraro admonas la klubanojn pagi la kotizojn por la venonta jaro. La Delegito de U.E.A. kolektas la U.E.A.-kotizojn por la venonta jaro kaj varbas novajn Individuajn Membrojn de U.E.A.. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato.

Raporto de la Liga Estraro pri la 3a jarkevarono. Okazis unu estrarkunveno kaj oni dissendis du cirkulerojn, el kiuj unu ankaŭ al la rektaj membroj. C. Støp-Bowitz reprezentis N.E.L.n ĉe la U.K. en Helsinko, la norvegan registaron reprezentis R. Bugge-Paulsen. En aparta kunveno dum la Kongreso la landaj asocioj de la nordaj landoj elektis komisionon por pli intima kunlaborado. C. Støp-Bowitz reprezentis N.E.L.n ĉe la 3a Lerneja Konferenco en Helsinko. Oni reguligis la abonkotizon kaj la anonctarifojn de Norvega Esperantisto. Oni klopodas realigi la ideojn pri vojaĝsekretario kaj pri kurso por movadaj gvidantoj, kaj planas aktivecon inter soldatoj kaj maristoj.

La Liga Estraro.

Ekzamentaj taskoj

Elementa ekzameno en Majo 1969. Diktaĵo.

Mirinda besto!

La filo de *peltkomercisto* / *edukis* sin por eniri / en la komercon de la patro. / Por perfektigi sin / li

faris vojaĝojn / al multaj landoj / en la tuta mondo. / Li studis la peltkomercon / kaj la modojn / en Parizo, Londono, / kaj la plej famaj urboj. / Kiam li revenis hejmen, / li rakontis ĉion al la patro. / «Sed mi ekhavis / bonan ideon,» / li diris, / «kiu revolucios

/ la peltindustriion / kaj riĉigos nin. / Mi *bredos* bastardon / inter *vizono* kaj gorilo. / Tio faros mirindan, belegan peltaĵon, / kiu elpuŝos ĉion malnovan, / kaj forkonkuros ĉion alian.» / «Tio ne taŭgos,» / diris la patro seke, / «ĉar la *manikoj* estos multe tro longaj.»

- eduki = utdanne, oppdra
- pelto = pels
- breĉi = oppdrette
- vizono = mink
- maniko = erme.

Tradukaĵo.

Alt for mye snakk.

En bonde hadde *festet* (1) en ny tjenestegutt. Da tjeneren kom til

gården (2), sa bonden til ham: «Jeg er en mann av få ord.» «Ja,» sa tjeneren. I mange dager sa de ikke noe til hverandre. Så en dag sa bonden: «Den hvite merra har født en fole.» «Ja,» sa tjeneren. Det gikk ennå noen dager. Da sa bonden: «Den hvite merra døde i natt.» «Ja,» sa tjeneren. Men neste dag sa tjeneren opp. «Men hvorfor? Har du det ikke bra her?» spurte bonden. «Det er alt for mye snakk om denne hvite merra,» sa tjeneren.

- 1) feste, ansette, hyre, leie = *dungi*
- 2) gård = bieno. *

LA KOTIZOJ DE N.E.L. 1970

Post la reguligo de la kotizoj, farita de la Norvega Esperanto-kongreso 1969, niaj kotizoj ekde 1970 estas:

Rekta membro ordinara	kr. 25,00
» » familia	» 10,00
» » junula	» 10,00
Kluba membro ordinara	» 20,00
» » familia	» 5,00
» » junula	» 5,00
» » juna familia	» 2,00
Subtenanta membro aldonas	kr. 10,00
Abono al Norvega Esperantisto (novembro)	kr. 12,00

LA KONTORFONDAĴO

Pli frue	kr. 1 114,00
B. Gahler	» 4,35
S. Murak	» 10,00
C. S. B.	» 20,00
A. Refsing	» 180,00

Kr. 1 328,35

Koran dankon al ĉiuj donacintoj!

Georg Syversen

Vendrede la 19an de septembro forpasis nia fidela samideano Georg Syversen en Løten.

Li naskiĝis en 1903 en Løten, kie li loĝis sian tutan vivtempon en la komenco de Esperantovegen. Kiam Georg Syversen estis juna,

la sistemo de instruado ne estis tiom perfekta kiel ĝi estas por la hodiaŭa junularo.

Plej ofte la geknaboj devis iri rekte el la 7-jara popollernejo, en la akran labortagon.

Komprenoble ne ĉiuj sukcesis en tia vivobatalo, — nur la plej taŭgaj sukcesis vivteni sin sufiĉe bone.



Riĉa, inteligenta personeco kiel Georg Syversen trovis sian sekuran fundamenton, kaj kun karakteriza sento por justeco, li per ĉiuj siaj fortoj emis porti al ĉiuj la saman sekuran vivfundamenton. Komence li laboris kiel butikekspedisto, kaj kun sia natura intereso por organiza vivo, li fariĝis solidareca sindikatano.

Pro politiko li ankaŭ havis intereson, kaj li trovis sian lokon en la Norvega Laborista Partio.

Tiamaniere li donis siajn fortojn al la publika vivo, kaj kiel elektita de sia partio al la komunumestraro, li faris multe da altvalora laboro en diversaj komitatoj.

Post la 2a mondmilito li dungiĝis kiel kontoristo, poste kiel sekretario en la komunumadministracio, kaj dum la lastaj vivjaroj li estis ŝtatoficisto, nome impostoŝekretario.

Kvankam Georg Syversen estis bona lokalpatrioto kaj altkvalita norvego, li sentis sin kiel filo de la tutmonda laboristaro.

Sekve liaj pensoj kondukiĝis al la demando pri komuna etika kaj lingva helpilo.

Tiamaniere li venis en kontakto kun la Esperantomovado, kaj kune kun laboristoj ĉe Ådalsbrug Jernstøberi (Ådalsbruk Ferfandejo) li ekstudis la Internacian Lingvon en la 1920-jaroj.

Por ili komprenoble SAT estis la natura medio.

Sed pro fajrokatastrofo en la fabriko komence en la 1930-jaroj, ĉiuj laboristoj translokiĝis, kaj Georg Syversen dum multaj jaroj estis «soleca hirundo» rilate al Esperanto en Løten.

Kiam en 1960 fondiĝis neŭtrala Esperantoklubo en Løten, ligita al Norvega Esperantista Ligo, Georg Syversen tre volonte fariĝis ĝia membro. Dum la jaroj kiel ano de «La tri verdaj steloj de Løten,»

li montris sin kiel senantaŭjuĝa kaj vastanima homo, preta al kunlaboro ankaŭ en la neŭtrala Esperantomovado.

En siaj lastaj vivojaroj li partoprenis en kongresoj, li multe korespondis kaj legis, kaj li plene dediĉis sin al nia kara ideo.

Ĉiam lia bela hejmo estis la natura kunvenejo por la klubo, speciale la plej junaj inter ni volas memori la ĉiam afablan «Esperantoonklon,» kun la ĉarma rideto kaj la amikecaj vortoj.

Kiam ni, ĵaŭde la 25an de septembro sekvis lin al lia lasta ripozejo apud Løten preĝejo, pastoro Erling Schau en sia bela memorparolado speciale menciis lin kiel la laŭmodelan noblan esperantiston, kaj en la nomo de la esperantistaro en Løten, li metis belan florkronon sur lian ĉerkon. Paco kun via memoro, kara Georg Syversen!

Per Johan Krogstie.

*

Prof. W. E. Collinson forpasis

En Junio forpasis en Liverpool, post longa malsano, prof. W. E. Collinson, mondfama lingvisto, kaj unu el tiuj, kiuj plej multe kontribuis al la rekono de Esperanto en lingvistaj medioj.

Prof. Collinson naskiĝis en 1889, doktoriĝis en Heidelberg, kaj estis universitata profesoro pri germana lingvo kaj lektoro pri Esperanto en Liverpool. Li estis membro de la Konsila Komitato

por Lingvistika Esploro de I.A.L.A., sed retiriĝis, kiam I.A.L.A. komencis oblikve evolui. Li verkis gravajn studojn nacilingve kaj Esperante, i. a. «La Homa Lingvo» kaj la ankoraŭ ne eldonita «Civilizo kaj Lingvo». Li estis vicprezidanto de Brita Esperantista Asocio, de la Lingva Komitato kaj poste de la Akademio, kaj prezidanto de I.S.A.E., kaj li estis kunlaboranto de Literatura Mondo, kaj membro de la Honora Patrona Komitato de U.E.A. de ĝia fondiĝo en 1957.

Prof. Collinson komprenis ankaŭ la norvegan lingvon, kun granda intereso li komparis la Esperantotradukon de «Peer Gynt» kun la originalo kaj kun alilingvaj tradukoj, kaj esprimis la opinion ke la Esperanta traduko multe pli bone redonas la originalon ol aliaj tradukoj. Li estis ankaŭ eble tiu, kiu kun plej granda aŭtoritateco avertis kontraŭ akcepto de aspektaj sencoj en la verboj de Esperanto.

Prof. Collinson estis milda, afabla, sincera homo, kiu ĝuis ĉies respekton kaj admiron. Lia memoro eterne vivos en Esperantujo.

C. Støp-Bowitz.

*

JOHN BERGGREEN 60-JARA

La 25an de Oktobro John Berggreen preterpasis la mejloŝtonon de la 60a datreveno de sia naskiĝtago. Jes, efektiva 60a, ne 40a,

kiel vi eble kredus! Li naskiĝis en 1909.

Berggreen estas esperantisto de 1931, li lernis la lingvon en kurso, kiun Ottar Fischer gvidis tiam en Sandefjord, li fariĝis prezidanto de la nove starigita Esperanto-klubo tie, kaj, estante skolto, ankaŭ komisiito de N.E.L. pri skoltaj aferoj. En 1933 li gvidis norvegan skoltrupon al la mondĵamboreo en Gödöllő, Hungarujo, kaj gvidis kunvenon de esperantistaj skoltoj tie.

Multajn jarojn poste ni trovas lin en Oslo, kie li baldaŭ fariĝis sekretario, poste vicprezidanto, kaj de 1964 estas la energia prezidanto de Klubo Esperantista, kaj ĉar la movado bezonas energiajn, iniciatemajn homojn kun novaj ideoj kaj kuraĝo por ilin efektivigi, li fariĝis prezidanto de la L.K.K. de la 2a Nordlanda Esperanto-Kongreso en Oslo en 1965, kaj en 1967 ĝenerala sekretario de N.E.L. Tamen li trovis tempon pasintjare plenumi ankaŭ la instruistan ekzamenon de Esperanto!

Inter la sukcese efektivigitaj ideoj de Berggren estas menciinda la granda Esperanto-ekspozicio en Oslo antaŭ kelkaj jaroj, kiu rezultigis plurajn kursojn. Ĉiuj klub-estraroj, jes ĉiuj membroj ankaŭ konas liajn lastatempajn cirkulerojn kun inspiraj novaj ideoj, i.a. pri la nuntempa speciala agado inter la skoltoj. La plej bonvena jubilea donaco, kiun la membroj povos doni al li, estas aktiva kunlaborado por efektivigi la planojn, kiujn li ellaboris.

La movado bezonas tiajn aktivulojn. Gratulante sincere en la nomo de la tuta movado ni deziras al li forton kaj sanon por ankoraŭ multjara aktiveco por Esperanto.

C. Støp-Bowitz.

*

Daŭrigo de la raporto.

La 41-a Norvega Esperanto-Kongreso

L. Anjer menciis la fakton, ke multaj esperantistoj estas membroj de aliaj organizaĵoj kaj tiel havas eblecon informi pri Esperanto. Li forte substrekis la gravecon de aktiva laboro en neesperantistaj rondoj, ĉar oni neniel povos disvastigi Esperanton, se oni nur laboras inter esperantistoj. Finante la diskuton pri punkto 6, la ĝenerala sekretario demandis ĉu la estraro rajtos uzi la necesan monon por provi realigi kiom eble plej multajn el la menciitaj proponoj. Li ricevis pozitivan respondon de la ĝenerala kunsido.

7. *Elektaj*: Okazis jenaj elektaj: Prezidanto: Carl Støp-Bowitz (reelekto)

Vic.prezidanto: Kjell Gustavsen (reelekto)

Ĝenerala sekretario: John Berggreen (reelekto)

Sekretariino: Signe Korstvedt (reelekto)

Kasisto: Karl Ekhaugen (reelekto)

Estraranoj: Olav Rygg (reelekto)
Kirsten Ek (reelekto)

Anstataŭantoj: Harda Danielsen (reelekto)
Alfred Skyberg (reelekto)
Otto Koren (reelekto), ĉiuj el Oslo.

Konsilantaranoj: Herolv Olsen, Tromsø (reelekto)
Steffen Kjetland, Haugesund (nova)
Elna Matland, Sauda (nova)
Lars Kåre Hunnes, Trondheim (nova)
Per Johan Krogstie, Løten (nova)

Revizoroj: John Selbekk, Oslo (reelekto)

Karen Sandberg, Oslo (reelekto)
La prezidanto informis, ke la Liga estraro pli frue elektis ĉefdelegiton de U.E.A. Alfred Skyberg (reelekto), kaj ĵus komitatano A de U.E.A. Ludvig Anjer (reelekto).

8. *Eventualaĵoj*:

a) Esperantonytt: L. Anjer klarigis kial Esperantonytt ne aperis dum la lastaj jaroj. La kaŭzo estis diversaj malfacilaĵoj, inter alie altigitaj preskostoj kaj problemoj koncerne la poŝtdistribuon. Li esperis, ke estos eble denove elsendi tiun gravan informilon.

b) Gazetara Servo: L. Anjer klarigis, ke la maloftan aperon de informoj de Gazetara Servo kaŭzis grandparte la bedaŭrinde neregula elsendo de informoj de U.E.A. La persono, kiu tie prizorgis la elsendon de informoj, transprenis alian taskon, kaj okazis interrompo.

c) Norsk Rikskringkasting. Programbladet: R. Bugge-Paulsen informis pri sciigoj en Programbladet. Dum la lastaj du jaroj aperis kvinfoje informoj pri la Esperanto-elsendoj eksterlandaj. Li petis la esperantistojn, ke ili skribu kelkfoje al N.R.K. por esprimi sian intereson pri tiuj informoj.

La prezidanto de N.E.L. fine esprimis sian dankon al La Tri Verdaĵoj de Løten, kies membroj treege bone aranĝis la Kongreson. Cetere li dankis al la estrino de Budor, Brit Dahl, al la komunumo de Løten pro bona akcepto kaj al pastro H. A. Rosbach pro la digna kaj bela diservo. Li ankaŭ dankis la kunvenprezidanton, J. Matland, pro lerta gvidado dum la kunsidoj kaj la kongresanojn pro bonaj proponoj kaj aktiva partopreno en la diskutoj.

NEOFICIALA KONGRESRAPORTO

pri la 54a U.K. en Helsinko
(dediĉita al nia senlaca karavanestrino, Kirsten Ek).

(Mel.: «Pål sine høner . . .»)

*Helsinki fine kongreson invitis,
kvardek norvegoj aliĝis al ĝi;
sed nur apenaŭ duono profitis
aviadil-karavanon kun ni.
Sed indikiloj troviĝis nenie,
ĉar la kongreso ja ne estis tie,
ĉe lagetaro ĝi kaŝis sin pie,
kaj ni ĝin trovis dank' al
Kirsten Ek.*

*Dipoli estis por ni kongresejo,
ne tutprecize laŭ mia sopir'.
Stranga domeg', labirint-kuniklejo,
sekvu de la arhitekta delir'.
Ĉiuj demandis pri kio kaj kie,
ĉar indikiloj troviĝis nenie,
kuris ĉirkaŭe ni tre energie,
helpon serĉante ja ĉe Kirsten Ek.*

*Dum L'Inaŭguro jam laŭ tradicio
festparodadis Lapenna al ni,
nun pri la lingva diskriminacio,
tre aktuala en nia medi'.*

*En I.S.U. tre variis la temoj,
ekde mondjuro, tra birdaj*

*problemoj
ĝis iuj finn-gramatikaj sistemoj;
ĉiujn aŭskultis kun ĝu' Kirsten Ek.*

*Ĉiuj ekskursoj tre bone sukcesis.
Bela vetero tre plaĉas al mi.
Sed evidente ja Porvoo forĝis
esperantistan guidanton por ni.
La teatraj prezentoj ne multe
plaĉis al mi, estas ja iom multe
ne doni finnajn, sed nun mi rezulte
diras: demandu nun al Kirsten Ek!*

*La U.E.A.-Komitato kunsidis
kun bedaŭrinde por ni rezultat':
ree kotizojn altigi decidis,
nova por nia monuj' forta bat'.
Kial oni ne serĉu pri pliaj
monenspezoj en fontoj aliaj
ol ĉiam sole en poŝoj la niaj?
tiel demandas kun mir' Kirsten Ek.*

*Kial kongresas eĉ la norveginoj,
kiujn allogas nur butikumad'?*
*Edzoj kunsidis, edzinoj, fraŭlinoj
kuris al Tapiola, kvazaŭ invad'.*

*Baldaŭ venis la hor' ĝis-revida
post la plej lasta tago kunsida.
La flugmaŝin' estas vere rapida.
Dankon pro lerta gvidad',*

Kirsten Ek!

Ŭo.

RECENZOJ

ESPERANTA MONDMAPO

La longa atendita Esperanta mondmapo aperis, antaŭ jam jaro. La redaktoro estas, kompreneble, lic. Tibor Sekelj. Eldonisto la Internacia Instituto por Oficialigo de Esperanto. Kaj la nomoj estas laŭ la decidoj de Internacia Komisiono por Ordigo de Geografiaj Nomoj. Jen la sekaj sed interesaj informoj. Necesas aldoni, ke la eldonkvanto estas 5000, kaj ke la prezo estas 1 \$ aŭ egalvaloro. Mendu ĉe la eldoninto—adreso: Zetska 4 a, Beograd.

La mapo estas granda, plur-kolora, kaj kun geografiaj nomoj en Esperanta formo. Ĉu ne kaŭzo por ĝoji kaj fieri? Jes, sed ne sen kelkaj protestoj. Nu, la eldoninto mem invitas al diskuto.

Nekonsekvencaj estas Sieraleono sed Sjeranevado, Bohemio sed Moravujo. Monstraj estas Gvatemalurbo, Singapururbo, Luksemburgurbo: almenaŭ ili tute ne estas internaciecaj.

Speciala malfacilaĵo estas la ambaŭflanka atento al la prononco kaj al la internacie konata skriba

bildo. Oni trovas monstrajn formojn: Sanlorensa Golfo anst. Sankt-Laŭrenca Golfo, Krisĉurĉo anst. Kristĉurĉo, Salsbrijo anst. Salisburio. Kaj ĉu ne Vaŝingtono kaj Birminghamo estas prefereblaj ol Vaŝintono kaj Birminhamo?

Malplej plaĉas al mi la kuntirado de 2—3-vortaj nomoj, tiel ke ili fariĝas unuvortaj. Tiel la nomoj samtempe fariĝas nerekoncible. Tristandakunjo staras meze sur la bela mapo. Princinastrida Bordo ne multe memorigas pri la filino de nia reĝo. Portospeno certe ne estas rekonebla por la loĝantoj de Port of Spain, kiu devus esti Port-o-Spano. Same Riodoro anst. Rio-de-Oro, Daresalamo, Kualalumpuro kaj multaj aliaj estas prefereblaj kun ligstreko.

Tiel oni povus daŭrigi. Sed tio sufiĉu por montri, ke mi neniel estas kontenta pri la solvo en multaj kazoj. Vi eble demandas min, ĉu ĉiuj nomoj de urboj ktp. trovas lokon sur la mapo. Feliĉe ne. Oni povas legi la nomojn tie troveblajn; ne estas amasigo de nomoj sur la mapo mem. La nomoj estas listigitaj laŭ la mondpartoj. Por Italujo oni ekz. prezentas la formojn de Romo, Milano, Torino, Palermo, Bolonjo — sed kial ne de Firenze? Efektive la formo Florenco povus esti elektable laŭ internacie vaste konata formo — sed ĉu ne preferebla Firenco, laŭ la itala formo — ne nur ĉar la italoj tiel diras, sed ankaŭ, ĉar ĉiam pli da homoj nomas la urbon

Firenze — kaj fine, ĉar Firenco estas belsona nomo.

Mi volas, en la nomo de multaj uzantoj de la mapo, peti al sinjoroj Waringhien, Sekelj, Mablesone, Armand, Butler, Faulhaber, Stöp-Bowitz kaj Thomson, denove studi la demandon. Ŝajnas, ke la afero ankoraŭ ne estas matura por Akademia decido.

JHR.

*

STUDENTA ESPERANTO-SOCIETO — ĈU ĜI ENDORMIĜIS?

Eble kelkaj legantoj faras al si la ĉi-supran demandon, ĉar ili lastatempe ne trovis materialon pri la societo. Per ĉi tiu raporto mi volas respondi, ke la societo tute ne endormiĝis.

Dum la unua duonjaro de 1969 Studenta E-societo krom la ĝeneralan kunvenon okazigis tri membrokunvenojn. En la unua Nils Chr. Stenseth informis pri la internacia E-movado, en la dua oni montris la du filmojn pri Oslo kun E-a parolado, kaj en la tria Otto Prytz donis impreson pri la junularaj kongresoj de TEJO. La ĉeesto en ĉiuj kunvenoj estis kontentiga, ĉar minimume 50 % de la membroj ĉeestis.

La elementa kurso, kiu komenciĝis pasintan aŭtunon, finiĝis en februaro. Poste oni ne aranĝis daŭrigan kurson, ĉar multaj el la interesiĝintoj devis preparadi sin por ekzamenoj.

Daŭr p. 105



FERVOJISTA PAĜO

ORGANO DE NORVEGA
ESPERANTISTA FERVOJISTA
ASOCIO — NEFA

Redaktoro: Odd Kolbrek,
Kaldbakkstubben 22, Oslo 9

Breifoss-akcidento

(Daŭrigo) — La rapideco altiĝas, fajreras de la bremsblokoj de la 2 unuaj kaj de la lastaj vagonoj en la trajno sed la bremsoj de la cisternvagonoj ne funkcias — certe pro la frosto dum la trajno iris laŭ la horizontala distanco laŭ la lago Ustevann, kaj la kriztempa oleo, pri kiu ili ofte plendis, malmoliĝis, rezultante ke la bremsblokoj ne funkciis. Dufoje antaŭe la sama trajno ne sukcesis halti, kaj preterpasis Geilo kaj unufoje Myrdal ĉar la bremsoj funkciis tro malrapide, sed la plendoj ne konsideriĝis.

Fossgård komprenas ke ne eblas por li kaj la hejtisto, forlasi la lokomotivon, veni malantaŭen por funkciigi la manbremsojn, pro la tegitaj varvagonoj. Li tial signaligas pere de la lokomotivfajfilo: «Funkciigu la bremsojn» kaj poste la danĝersignalon, — vico da mallongaj signaloj por doni sciigon al la trajnestro, konduktoro Kartevold en la konduktorvagono plej malantaŭe en la trajno. La signalo aŭdiĝis de lokigita grupo da germanaj SS-soldatoj inter Ustaoset

kaj Geilo. Ili vidis la venantan trajnon kaj poste atestis ke fajreris de la bremsblokoj antaŭe kaj malantaŭe en la trajno.

Malsupre en Hallingdal el kontraŭa direkto venas la noktotrājno Oslo—Bergen supren laŭ la deklivo de Al al Geilo, kie trajno 607 laŭ la deĵorhoraro kruĉiĝu kun trajno 1428. Unu el la plej fortaj altmontarlokomotivoj de la Bergenfervojo 403, altpremmaŝino kun 8 movigradoj, faras malgraŭ la kruta tereno, sufiĉe grandan rapidecon. La trajno konsistas el poŝtvagono plej antaŭe, poste 3a klasa sidvagono kun 30 pasaĝeroj, 5 dormvagonoj kaj pakaĵvagono malantaŭe. Ordinaraĵ norvegaj civilpersonoj devas kontentiĝi, se ili ricevas sidlokon en la noktotrājno, kaj ili ĉiam lokiĝis el la plej antaŭe iranta pasaĝervagono «kiel minobalaistoj». En Geilo stacio la trajnkespedisto Dahl-Michelsen eliras je la 2,47a por kontroli, ke ĉio estas en ordo por la kruciĝado, kiu okazu post 9 minutoj. Jam alveninta al la elirpordo, li vidas ke la cisterntrājno venas.

(Daŭrigota)

Daŭr de p. 103

Ankaŭ post la somera ferio Studenta E-societo estis aktiva. La 18-an de septembro okazis ĝia ĝenerala kunveno, dum kiu oni aprobis la raporton kaj kalkulon pri la unua duono de 1969. Ĉar Ole Skaane ne akceptis reelekton kiel prezidanton, oni iom ŝanĝis la konsiston de la estraro. La nova estraro estas la jena: prezidanto: Nils Chr. Stenseth, vicprezidanto: Otto Prytz, sekretario: Harald Støp-Bowitz, kasisto: Karin Fjellhammer, estrarano: Ole Skaane. Kiel anstataŭantoj elektiĝis Stefan Murak kaj Lars Groot, kaj kiel revizoroj Truls Reinskou kaj Carl Støp-Bowitz. Ĉiuj komisiitoj reelektiĝis: studgvidanto estas Carl Støp-Bowitz, informestro Nils Chr. Stenseth, komisiito por la eldonejo Harald Støp-Bowitz, kaj raportanto al «Norvega Esperantisto» la subskribinto. La ĝeneralan kunvenon ĉeestis ok personoj.

Sed la societo ankaŭ montris sin al la ĝenerala publiko. La 25-an, 26-an, 27-an kaj 29-an de septembro funkciis E-stando sur trafikata loko en la Universitato, Blindern. Ĉe la stando oni ekspoziciis E-literaturon, disvendis lernolibrojn kaj ŝlosilojn, disdonis informmaterialon kaj diskutis kun interesiĝintoj. La 29-an de septembro okazis informa kunveno, dum kiu Otto Prytz preligis sub la titolo «Hvorfor Esperanto?» kaj C. Støp-Bowitz pri E-o en la scienco kaj inter la studentaro. Post la prelegoj okazis diskutado.

Konsiderante, ke oni ĉe la stando disdonis ĉ. dumil informfoliojn pri la kunveno, oni devas bedaŭri, ke la kunvenon mem ĉeestis nur dudek personoj. Tamen mi estas konvinkita, ke la disdonita materialo ne estas perdita.

La plej granda konkreta rezulto de la informkunveno estas, ke ekfunkcias komenca kurso gvidata de Karin Fjellhammer. Krome Otto Prytz gvidos studrondon por tiuj, kiuj bezonas ekzercadon pri konversacio.

Ĉiuj menciitaj aranĝoj okazis en Blindern, kaj mi havas la fortan impreson, ke precipe la E-stando kreis pozitivan intereson inter la studentaro. Tiu intereso plifortiĝu kaj manifestiĝu konkrete!

Raportis Otto Prytz.

Norvega Kroniko

Pro multe da materialo, kiun ni devis presigi, amasiĝis raportoj al la Norvega Kroniko. Multaj el tiuj, ricevitaj tuj antaŭ la somero, informas pri novjaraj aranĝoj k.s. Tiaj raportoj estas nun konsiderataj tro malnovaj. Ni petas pardonon ĉe la raportverkintoj, kiuj ne povos legi tiujn produktojn en nia gazeto. Ni kaptas la okazon por peti viglan kaj regulan raportadon.

Red.

Kristiansand

Kristiansand Esperantoklubb havis kunvenon la 22-an de majo.

Oni preparolis kurson por la

skoltoj. S-ro Reinertsen, kiu persone konas kelkajn skoltojn, kontaktos tiujn, por ke ni sciu, ĉu ekzistas intereso por tiu projekto.

B. V.

Holden

Jarkunveno de Ascendo.
Jarrenkonto estis aranĝita ĉe la prezidanto de Ascendo en marto.

La tuta estraro estis reelektita, raporto aprobita kaj kasisto des-argita.

La klubo interŝanĝis sonbendojn kun la Bradforda Esperanto-societo. La sonbendo poste iros al Francujo. Ŝajnas ke Anglujo estas pli Esperanto-konscia ol la «lingvo-satelitoj skandinavaĵaj».

Nun kiam la kunlaboro inter la nordaj ŝtatoj ŝajnas intensivigi, eble estus ideo por Esperanto pli konkrete partopreni en la «norda koncerto» kiel «asociiĝinta». Finnlando ja estas «matura» por vasta uzo de Esperanto eĉ interskandinavie. Por esti kovritaj lingve, la finnoj ja devus scii la svedan, rusan, germanan kaj anglan. Se tio povus reduktiĝi al la sveda kaj Esperanto, oni multe ŝparus. Islando ja estas en la sama kategorio kiel norda ŝtato, kvankam pli angle-orientita. Esperanto ja solvas la interkomunikajn problemojn por ili. Do se oni en eventuala Norda Unuiĝo povus uzi ek. la svedan plus Esperanton kiel «laborajn lingvojn», jam granda regiono estus gajnita por Esperanto. Oni jam nun faru batalplanon.

Post vigla interbabilo oni tran-

siris» al la bela kafotablo de s-ino Fridén, kie oni estis regalata per bonaj pantranĉoj kaj kukoj.

Ref.

Oslo

Klubo Esperantista en Oslo.

21/4.69. Aase Gustavsen rakontis, kiel ŝi fariĝis esperantisto. Jam kiel infano ŝi renkontis Esperanton pere de Karsten Langsholt en Sarpsborg. Ĉar en ŝia hejmo en Oslo venis eksterlandaj gastoj — kiuj parolis Esperanton — ŝi deziris lerni la internacian lingvon. Ŝi aliĝis kurson, kiun gvidis Astrid Mansrud kaj alian kurson kun Knut Norrvall kiel instruisto.

Otto Prytz prizorgis la lingvan instruadon. La temo estis «Når skal vi bruke imperativ på Esperanto?» Poste sekvis interesa dialogo, en kiu partoprenis multaj el la ĉeestantoj. Otto Prytz treege bone kaj profunde regas la gramatikajn problemojn, kaj L. Anjer petis lin je alia okazo daŭrigi la klarigojn de la temo.

7/5.69. La prez., John Berggreen deziris bonvenon al la kunveno, kaj specialan bonvenon li deziris al la 9 junaj gelernantoj de Astrid Mansrud, kiuj prezentis la teatraĵon «La ŝtelita mono». La junaj aktoroj mirinde bone ludis, kaj la elparolo de Esperanto estis treege bona kaj klara. Ili ankaŭ kantis plurajn Esperanto-kantojn.

John Berggreen prelegis pri «Satelitoj kaj estontaj perspektivoj». Unue li donis superrigardon esperantlingve, kaj la prelegon li

prezentis en la norvega lingvo. Li rakontis pri la diversaj «Sputnikoj», satelitoj kaj spacveturadoj kaj pri la signifo de tiaj multekostaj aventuroj.

La Kluba Kantgrupo kantis «Bonvenon ĉarma bela majo» (melodio de Schubert) kaj komune la klubanoj kantis plurajn kantojn laŭ akompano de Carl Støp-Bowitz per akordiono.

19/5.69. La prez. John Berggreen legis cirkuleron de NEL al la kluboj, pri «Skolto-Agado». La celo estas interesigi la skoltojn por Esperanto — precipe ĉar en 1970 la Mond-ĵamboreo okazos en Japanujo, kie Esperanto verŝajne estos deviga komuna lingvo.

Annalise Torgnes ĵus vizitis la italan urbon Palermo. Si transdonis saluton al nia klubo de la esperantistoj en Palermo.

Carl Støp-Bowitz rakontis ke li, kiel ĉef-kunlaboranto, kaj Eva Støp-Bowitz, kiu prizorgas la desegnaĵojn por la nova Plena Ilustrita Vortaro, estis en Parizo por konferenco pri detaloj. La vortaro konsistos el 2 volumoj — proks. 1200 paĝoj — kaj verŝajne estos preta antaŭ kristnasko.

Pepita de Caspary — en nacia kostumo (kataluna?) pritraktis la hispanan romanon «Soleco», verkitan de Victor Català, kiu spite la viran nomon estas virino — kaj katalunanino (same kiel Pepita de Caspary). «Soleco» estas memoriga libro de la 53-a U.E.A.-Kongreso en Madrid 3.—10/8.69. Pepita de Caspary donacis ekzempleron de

la libro al la kluba biblioteko. Ŝi admonis la klubanojn demandi pri la libro en la publikaj bibliotekoj, tiel ke ili aĉetos ĝin.

John Berggreen raportis pri Landaj Kongresoj en Svedujo kaj Danujo, kiujn li vizitis, kaj donis superrigardon pri la diversaj eroj de la programoj. En Svedujo li iniciatis unu-horan diskuton pri kunlaboro, interŝanĝo de ideoj k.s.

28/5.69. Kiel en antaŭaj jaroj ni iris ŝipe de Oslo al Oxval, Nesodden, por pasigi la lastan kunvenon antaŭ la somer-ferioj en la somerdomo de Eva kaj Carl Støp-Bowitz.

Kiel prez. de la Ekzamena Komisiono C. Støp-Bowitz disdonis ekzamenajn diplomojn al 6 knabinoj kaj knaboj, lernantoj de Astrid Mansrud.

Ankaŭ al jenaj, kiuj plenumis la elementan ekzamenon, li disdonis diplomojn:

Astrid Bremsrud, Harald Triveld kaj Halvor Ueland.

La gelernantoj de Astrid Mansrud denove prezentis la skeĉon «La ŝtelita mono», kiun ili mem verkis; kaj kantis.

Laŭ akompano de la akordiono de C. Støp-Bowitz ni komune kantis plurajn kantojn, kaj Astrid Mansrud gvidis diven-ludojn.

Ni manĝis kunportitajn buterpanojn kaj kukojn, trinkis kafon aŭ mineralakvon, kaj dancis ĝis estis tempo por foriro al la ŝiporeen al Oslo, post pasigo de tre agrabla kaj sukcesa vespero.

A, Maramures, *Baia Mare*, Rumanujo.

Kelnero-kuiristo deziras trovi amikojn en la tuta mondo; kolektas poŝtmarkojn, bildkartojn, kaj insignojn Esperantajn. Vláda Hasala, S. K. Neumanna 37, *Hodonín*, Ĉeĥoslovakujo.

Esperante viziti Norvegujon mi deziras plumamik(in)on mezaĝan. Ankaŭ miaj 3 gelernantoj 13 jaraĝaj deziras gekorespondantojn samaĝajn. E. D'Aute-Hooper, 25 Douglas Road, Acocks Green, *Birmingham* 27, Anglujo.

*

Sankta Johano vespero (23/6.69) 21 membroj kaj 5 gastoj venis al la somerdomo de Else Bugge-Paulsen, Haglund ĉe Tyrifjorden.

Kelkaj el la partoprenantoj banis sin en la fjordo. Ni altabliĝis al tabloj, bele ornamitaj per floroj, kaj manĝis amason da buterpanoj kaj kukoj. Ni ankaŭ kantis plurajn Esperantajn kantojn laŭ akompano de C. Støp-Bowitz per tirharmoniko kaj Randolf Grotmål per gitaro. Poste ni kolektiĝis ekstere, kie ni dancis kaj ludis. Multaj el la ĉeestantoj partoprenis en amuzaj malgrandaj skeĉoj, aranĝitaj de Brynhild Østmo.

Je la 23-a horo ni iris al la strando, kaj en la somermeza nokto ekbruliĝis granda Sankta Johano fajro. Else Bugge-Paulsen regaligis nin per bongusta pizosupo kun pano. Oni vigle kantis laŭ akompano de akordiono kaj gitaro. R. Grotmål ankaŭ prezentis al ni kelkajn islandajn kaj feroajn kantojn.

Raportis *Harda Danielsen*.

Korespondu!

Tre volonte mi korespondus kun vi. Marie Ginzlova, Namesti Miru 1746, *Ceská Trebová*, Ĉeĥoslovakujo.

46-jara fabriklaboristo, komentanto, deziras korespondi, Pinteagrönöveg, str. Caramizi n.ro 103

NORSK ESPERANTO-FORBUND

(*Norvega Esperantista Ligo*)

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30
Kontoradresse: St. Olavsgate 27 III, Oslo
Telefon: 20 20 83

Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30-16.30

Turisma Servo: Boks 942, Oslo.

Postgiro 100.32

ESPERANTOFORLAGET A/S

(*Eldonejo Esperanto A/S*)

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31
Kontoradresse: St. Olavsgate 27 III, Oslo
Telefon: 20 20 83

Ĉefdelegito de U.E.A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,
Oslo 6. Postgiro 133.29

La redakcio:

Privata adreso de la ĉefredaktoro:

Johan Hammond Rosbach,
Hulderveien 17 B, N-1700 Sarpsborg. —
Uzu tiun adreson, kiam temas pri urĝaj
sendaĵoj. — Telefono: 54 727

Ekspedejo de Norvega Esperantisto:

Boks 942, Oslo 1.

Trykk: A. Sæther A.s - Hamar